fari pri tiu ĉi kreitaĵo, kiam mi rehejmiĝos" kiam denove ĝi gruntis, gruntis tiel forte kaj tiel *porke*, ke ŝi derigardis, mirigite, eĉ timigite, en ĝian vizaĝon. Oni jam ne povus dubi plu: jen porkido, vera porkido. Ŝi tuj sentis ke estus absurde porti ĝin plu.

Do ŝi mallevis la besteton, kaj vidis ĝin, tuj post la mallevo, fortroti trankvile en la arbaron. Kaj jen por Alicio granda senzorgigo, "ĉar" diris ŝi "kiam ĝi estos plukreskinta ĝi fariĝos terure malbela infano, kvankam nun, se oni nomos ĝin porko, ĝi tre bone aspektas."

Ŝi komencis pripensi aliajn infanojn de ŝi konatajn, kiuj pli bone taŭgus kiel porkoj kaj ĵus diras al si "se nur oni scius la metodon ŝanĝi ilin"—kiam subite ŝi eksaltas mirigite; jen, tutapude, sidas sur arbobranĉo la *Ĉeŝŝa* kato.

"Sinjoro *Ĉeŝŝa* kato"—Ŝi komencis malkuraĝe, ĉar ŝi ne povis konjekti ĉu ĝi ŝatus tiun formon, aŭ preferus "Via kata moŝto."

Tamen, ĉar ĝi nur grimacis pliamplekse, Alicio konkludis ke ĝis nun ĝi ne ofendiĝis. Ŝi do daŭrigis:—

"Ĉu vi afable diros al mi, mi petas, laŭ kiu direkto mi devas iri de tie ĉi?"

"Tio *iom* dependas de la loko kiun vi celas" diris la Kato.

"Ne tre grave al mi kien——" komencis Alicio.



"Sekve, ne tre grave en ki
interrompis la Kato.
"Se nur *iun* lokon mi
daŭrigis.
"Ho, iun aŭ alian vi nepre a
la Kato "se nur sufiĉe longe v
Alicio konfesis en si ke *t*
nei. Do ŝi eksperimentis al
"Kiaj personoj loĝas proksim
"En tiu direkto" diris la
gante la dekstran antaŭpi
loĝas, kaj en jena (montrante
Martleporo.[1] Vi vizitu kiun
frenezaj."
"Sed mi ne volas renkonti
Alicio.
"Ho, tion vi ne povas e
Kato "ĉe ni ĉiu estas freneza
estas freneza; ankaŭ vi!"
"Kiel vi scias ke mi estas
demandis.
"Nepre" diris la Kato "ĉ
tien ĉi."
Ŝajnis al Alicio ke tio tut
tamen, preterlasante sin, ŝi d
vi scias ke vi estas mem frene
"Por komenci" la Kato r
sentas ke hundoj ne estas fre

[1] "Same freneza kiel leporo en Marto

LEWIS CARROLL *La Aventuroj de Alicio en Mirlando* Esperanto translation (Illustrated by Brinsley Le Fanu) LONDON, 1910 THE BURSTE